

*(La sekvan tekston akceptis kunveno de sciencistoj, verkistoj, internaciaj edukistoj kaj aliaj, okazinta en septembro 1989 en Vankuvero, Kanado, sub la aŭspicio de Unesko).*

## VANKUVERA DEKLARO PRI PLUVIVADO EN LA 21a JARCENTO

### Resumo

La pluvivado de la planedo fariĝis centra kaj urĝa temo. La hodiaŭa krizo postulas rapidegajn respondojn sur ĉiuj kampoj – sciencaj, kulturaj, ekonomiaj, politikaj – kaj plikonsciigon de la tuta homaro. Ni devas unuiĝi kontraŭ komuna minaco: ĉiuspecan agadon, kiu ŝancelas la median ekvilibron au malriĉigas nian heredaĵon al estontaj generacioj. Pri ĉio ĉi nun temas la Vankuvera Deklaro pri Pluvivado.

### La defio de la pluvivado

Nia planedo estas malstabila, kvazaŭ konstante ŝanĝiĝanta varmomaŝino. La vivo aperis sur ĝia surfaco antaŭ ĉ. kvar miliardoj da jaroj, kaj evoluis en ekvilibro kun naturmedio kie regas subitaj neantaŭvideblaj ŝanĝoj. La malkovro de fosilia energio, antaŭ pli ol 200 jaroj, povigis la homaron superregi la tutan tersurfacon. En nekredeble mallonga periodo, senplane kaj preskaŭ senkonscie, nia specio fariĝis senegale la plej grava ŝanĝofaktoro sur la planedo.

La sekvoj estas drastaj kaj por nia specio senprecedentaj:

–la loĝantara kresko plirapidiĝis dum la lastaj 150 jaroj, tiel ke el unu miliardo da homoj fariĝis kvin miliardoj, kun aktuala duobliĝperiodo de 30–40 jaroj;

–simile plivastiĝis la utiligado de fosilia energio, kio siavice kaŭzis tutgloban polucion kaj ŝanĝojn en klimato kaj la marnivelo;

–ĉiam pli rapide detruigis la vivmedio, kio enkondukis grandegan kaj nemalfareblan formortadon en la biosfero – la bazo de la tera ekosistemo;

–neimageblaj kvantoj da rimedoj kaj homa inventemo elspeziĝis por la milito kaj por preparoj kontraŭ la milito.

Ĉion ĉi pravigis kredo je la neelĉerpeblo de la planedaj rimedoj, kaj ĝin stimulis politikaj kaj ekonomia sistemoj, kiuj preferas la rapidan profiton al la kalkulado de la efektivaĵoj.

La nuna defio al la homaro konsistas el la detruigo de ĉiu ekvilibro inter nia specio kaj la cetera vivaĵaro sur la planedo. Paradoxse, dum ni troviĝas rande de ekosistema malkonstruo kaj malplivaloriĝo de la homa vivo, nia scio kaj nia scienco atingis sufiĉan nivelon por provizi la kreivon kaj la teknikon necesajn por ekripari la damaĝon kaj remalkovri la harmonion inter la naturo kaj la homaro. Mankas nur la socia kaj politika volo.

### La ekesto de la problemo

Nian hodiaŭan problemaron esence naskis difinitaj evoluoj en la scienco, kompletigiĝintaj antaŭ la komenco de ĉi tiu jarcento. Tiuj evoluoj, matematike kodigeblaj en klasika–mekanika bildo de la universo, donis al la homo povon super la naturo kiu ĝis antaŭnelonge produktis ĉiam pli ampleksan, ŝajne senliman fluon de konsumeblaj varoj. Kaptita en la eluzado de tiu povo, la homaro emis ŝanĝi siajn valorojn en tiujn, kiuj stimulis kaj pravigis la plejan realigon de ĝia materiala potencialo. Analoge okazis subpremo de valoroj ligitaj al aliaj dimensioj de la homo, fundamentaj al pli malnovaj kulturoj. Tiu malriĉiĝo en koncepto de la homo, kaŭzita de la malagnosko de aliaj homaj dimensioj, akordas precize kun la "scienca" koncepto de la universo kiel maŝino kaj la homo kiel ĝia radeto.

La koncepto de la homo pri si mem estas ĉefa determinilo de siaj valoroj; ĝi difinas la "memon" kiam li agas "meminterese". Tiel la ideologia malriĉiĝo pro bildigo de la homo kiel maŝinradeto kondukas siavice al valormalvastiĝo. Tamen, la scienca progreso en la nuna jarcento jam demonstris, ke eĉ el pure scienca vidpunkto ne taŭgas la mekanika bildo de la universo. Sekve malvalidiĝis la pensobazo sub la mekanikisma koncepto de la homo.

### Aliaj vizioj

La hodiaŭa scienco anstataŭigas la malnovan, rigide mekanikan bildon de la universo per konceptoj akordigeblaj kun universo, kiun konstante kaj kree formas procezoj ekster la rigidaj limoj de mekanikaj legoj. La homo mem fariĝas aspekto de tiu krea impulso, kaj integriĝas kun la tuta universo en maniero neesprimebla per la malnova mekanikisma konceptaro. Tiel la "memo" aliformiĝas, el determinisme regata maŝineg-radeto en aspekton de libera kreimpulso, propre kaj senpere ligitan al la universo kiel tuto.

Tiel, en ĉi tiu nova scienca vizio, la homaj valoroj vastiĝas por akordiĝi ankaŭ kun tiuj akceptitaj en pli fruaj kulturoj. Ĝuste en tiu kadro de konverĝaj bildoj pri la homo provizitaj per lastatempaj evoluoj en la scienco kaj kulturo, ni serĉas viziojn pri tia estonteco, kia povigus la homon pluvivi digne kaj en harmonio kun sia medio.

La homa specio atingis limojn en sia uzo de la nehoma mondo kaj limojn ankaŭ en sia kapablo adaptiĝi al ŝanĝiĝanta sociakultura medio. La evoluantaj sciencaj perceptoj de la homo sugestas, ke li povos rekapti perditan fidon kaj perditan diversecon en siaj spiritaj konoj. La nuna kriza situacio en la homa okupado de la planedo postulas novajn viziojn, radikajn en diversaj kulturoj, por pricerbumi la estontecon:

percepti vivan makrokozmon teksitan el la vivoritmoj, ebligis al la homo reintegri sin kun la naturo kaj ekkompreni sian rilaton, tempan kaj spacan, al ĉio viva kaj la fizika mondo;

rekoni, ke la homo estas aspekto de la krea procezo formadanta la universon, vastigus la bildon de la homo pri si mem kaj ebligis al li translimi sian egoismon, la precipan kaŭzon de malharmonio inter siaj samspecianoj kaj inter la homo kaj la naturo;

venki la disigitecon de la unuo korpo—menso—spirito, kaŭzitan de eksterproportia emfazo pri unu el ĝiaj elementoj super la aliaj, ebligis al la homo malkovri en si mem spegulbildon de la kosmo kaj ties plej superan unuecprincipon.

Tiaj vizioj ŝanĝas la koncepton pri la homa naturo kaj alvokas por radikala transformo de modeloj pri socia evoluo; por la forigo de malriĉo, senscio kaj mizero; por halto en la vetarmado; por la enkonduko de novaj lernprocezoj, edukistemoj kaj mensaj sintenoj; por la aplikado de pli bonaj formoj de redistribuado cele al socia egaleco; por nova vivmaniero bazita sur malpli da forĵetado; por respekto al la vivdiverseco, soci-ekonomia diverseco kaj kultura diverseco anstataŭ eksdataj konceptoj de suverenco.

La scienco kaj tekniko nemalhaveblas al la atingo de tiuj celoj, sed ili povos sukcesi nur dank' al direktosento perita de la scienca-kultura integriĝo, kiu siavice devos venki la perdon en interkultura komunikado kaŭzitan de jarcentoj da displitiĝo.

Se ni malsukcesos redirekti la sciencon kaj teknikon al la fundamentaj bezonoj, la progreso en informadiko (sciakaparo), biotekniko (specipatentado) kaj geningenierio (mapado de la homa genaro) sekvigos nemalfareblan damaĝon al la estonta homa vivo.

La tempo urĝas — ĉiu prokrasto en la realigo de tutmonda ekokultura paco nur plialtigos la kostojn de la pluvivado.

Ni devas agnoski la efektivecon de multreligia mondo kaj la necesecon de tia toleremo, kia ebligis la kunlaboron de ĉiuj religioj, sendepende de iliaj diferencoj. Tio kontribuas al la certigo de la homa pluvivado kaj al la vartado de komunaj kernvaloroj: la interhoma solidareco, la homaj rajtoj, la homa digno. Jen la komuna heredaĵo de la homaro, derivita el nia percepto de la translima signifo de la homa ekzistado, kaj el nova tutgloba konscio.

### Subskribis:

Akyeampong (Ganao), d'Ambrosio (Brazilo), Chouraqui (Israelo), Dansereau (Kanado), Dallaporta (Italio), Elmandjra (Maroko), Genoves (Meksikio), Heden (Svedio), King (Britio), Masini (Italio), McLaren (Kanado), Nakamura (Japanio), Otero (Kubo), Random (Francio), Riman (Ĉeĥoslovakio), Soedjatmoko (Indonezio), Stapp (Usono).

-----